

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, ĝen. sek. de Tour.Club de France, Paris.
Teo Jung, Köln (Kolonjo).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literaturredaktoro: Zanoni.

ESPERANTO

TRIUMFANTA

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Rejnlando, Germanio.
Germ. poŝteka konto 70865, por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptojn oni skribu sur unu flanko de l' papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝtim. Adresu ĉion al n-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ

ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemple aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiuj stacidomaj gazet-vendejoj, hoteloj, kafejoj kaj restoracioj.

Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrado per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-esperantistaj) povas ricevi ET por propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

JARABONO:

5 dolaroj, 6 guldenoj, 10 svedaj kronoj, 12 svisaj frankoj, 12 ŝilingoj, 12 danaj aŭ norveĝaj kronoj, 12 pesetoj, 20 francaj aŭ belgaj frankoj, 30 liroj, 70 finaj markoj, 70 ĉsl. kronoj, 250 hung. kronoj, 600 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu 60 germ. mk., Estonio 40 germ. mk. — Ne estas neceso pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungalliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvarontare 15 mk., aŭ rekte ĉe la administrado Köln Horrem, Germanio, (ĉiu numero banderolita 1,25 mk.).

ANONCOJ

kostas po cm² (kvadracentimetro) 1,50 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĝis 30% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%). ANONCOJ kostas por 1-2 foja enpresado kaj 25 vortoj dekonon de la jarabono aŭ 6 respond-kuponoj; por 5-8 foja enpresado ni kalkulas la duoblon. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto (5 n-oj). — Familiaj anoncoj (naskigo, fianĉigo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉefkunido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage. En korespondaj anoncoj ni forstrekas ne-necesajn kaj naivaĵojn.


Numero 58.

Edinburgh, Paris, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas, 13. Nov.


Jaro 1921.



Pentrinda rivero Onyar fluanta tra la urbo.



Katedralo: Detalo de la Klaŭstro.



Vojo al Montjuic.

Kongreso kaj Floraj Ludoj de Kataluna Esperantista Federacio en Girona (15.-17. Oktobro 1921).

Jam en la antaŭa n-o ni komencis raporti pri la bone sukcesinta kongreso de K. E. F. Jen la daŭrigo:

Inter alie decidis oni aprobi sendi gratulajn leterojn al la delegitoj de la 13 ŝtatoj subskribintaj la peton pri raportoj prezentata al la Ligo de Nacioj kun la celo enkonduki Esperanton en la ŝtatoj lernejoj, ankaŭ danki s-on d-ron Nitobé pro lia viva intereso pri Esp. elpruvita okaze de la XIII-a, sciigi la ĝeneralan sekretarion de la Ligo de Nacioj, ke K. E. F. volonte havigos al li ĉiujn detalojn pri la stato de la esperanta movado en Katalunio;

plie atentigi la hispanan Ministraron de Publika Instruado pri nia celo.

Fine oni decidis esprimi al la Akademio kaj Lingva Komitato nian ĝojon kaj gratulon pro tio, ke ili subtenas nian lingvan Fundamenton kontraŭ danageraj deflankigoj.

Post la labora kunsido ĉe la ĝardenoj „La Devesa“ la kongresanoj dancis sardanajn (popola kataluna danco) kaj ĉe kafejo kunvenis la okultivuloj, kie gaje ili trinkis vermuton.

Ferma kunsido de la kongreso okazis je la 4-a posttagmeze, ĉe sama loko, kie okazis la labora, kaj la prezidanto s-o Gili Nortia prezentis s-on E. Gastón el la Aragona Esperantista Federacio, kiu salutis la kongreson kaj kiun oni akceptis per tondra aplaŭdado.

Oni elektis la novan komitaton de K. E. F. Kiel prezidanton oni reelektis s-on Gili Nortia kaj ankaŭ estis reelektataj s-oj Amades, Jaume Grau, Claramunt, Navas, Pruna, Adam kaj elektataj s-oj Guardiet, Soler kaj Castells.

Post la elekto la prezidanto dankis la kongreson, kiu denove konfidis la direktadon de K. E. F. al la plejmulto el la komitatanoj ĝis tiam laborintaj, promesante ke ili faros ĉion eblan por daŭrigi senhalte la laborojn entreprenitajn.

Oni transiris al la elekto de la urbo por nia venonta kongreso, kaj post malmultaj vortoj de s-o Josep Albagés, prezidanto de la grupo „Bela Espero“ el Manresa, oni per varma aplaŭdado akceptis la proponon okazigi la X-an Kongreson de K. E. F. en la urbo Manresa.

Per la strofoj de nia himno vigle kantataj de la multenombra ĉeestantaro oni finis la laborojn de nia sukcesplena kongreso.

VIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

Je la 5-a posttagmeze, ĉe la granda Teatro Principal, kiun plenigis granda popolamaso konsistanta plejparte el neesperantista publiko, okazis nia rava Festo de la Poezio.

Ĉe la belege ornamita scenejo sidis la aŭtoritatuloj el Girona kaj la ĵugantaro de la Floraj Ludoj kune kun la estraro de K. E. F.

S-o E. Pellicer, sekretario de la Floraj Ludoj, legis la raporton, en kiu detale li priskribis la grandegan kaj malfacilan taskon juĝi la 77 ricevintajn manuskriptojn el aŭtoroj apartenantaj al 16 malsamaj nacioj.

Oni proklamis gajninto de la plej valora premio: la Natura Floro, s-on Artur Domenec Mas el Barcelono, kiu akompanate de la kunsidantaj aŭtoritatuloj kaj esperantistoj el la prezida

loko, Irlis proponi la premion al la ĉarma fraŭlino Teresa Bartina, elektita Reĝino de la Festo, kiu akompanate de sep belgaj koregimentoj eniris la teatron ĝis la trono ĉe la scenejo meze de la sonoj de nia kara himno kaj de bruega aplaŭdado.

Kiam silento fariĝis, la laŭreata poeto deklame legis sian belan verkon „Al Rozo“, kiun oni premis per granda ovacio.

Poste la sekretario daŭrigis la legadon de sia raporto, kaj la aŭtoroj iris ricevi la aljuĝitajn premiojn el la manoj de la simpata reĝino.

Ni povas citi la nomojn de kelkaj el la premiataj aŭtoroj, kiuj montris la gravecon de nia Literatura Festo: F-ino Louise Briggs, Jaume Grau, Julio Baghy, Josep Ventura, Marian Solá, S. Alberich, J. D. Applebaum, Iv. H. Krestanoff, Helena Hampel, Kolomano de Kalocsay, Umberto Toschi, Emma L. Osmond, Luigi Puppo, Renaud Richez, Hans Sappl, Ernest Schmitz, Nicola Jäger, Walter Lippmann, Paŭlo Balkanyi, Maria Elworth-Posenacer, Paŭlo Medem, k. a.

La tri Fundamentaj Reguladoj.

La unua el la du plej urgaj taskoj de la esperantologio.
De Eugen Wüster.

(Daŭrigo kaj Fino.)

Ni jam diris en la II-a parto sub 3a, ke multaj esp-istoj konsideras -ec- kaj -ad- atributaj substantivaj vortelementoj, tiel ke la diferenco konsistas nur en tio, ke krome la unu sufikso enhavas aŭ supozas (laŭ interpreto) antaŭirantan adjektivan kaj la alia verban ideon. Ĉar post substantiva ideo ĉe pluformado la finaĵo -o povas esti forjetata sen anstataŭado, do ŝajnas, ke, ĉe akcepto de tiu opinio, -ec- kaj -ad- dividus inter si ĉiujn funkciojn de la dezirata ĉiam aplikibla pluformadilo. Alivorte, ke ne nur por la formoj prezentitaj sub 2 oni povus diri san-ec-a, san-ec-isto, varm-ec-igi, senmov-ada kontraŭ milit-adul(o), sed konforme en ĉiuj kazoj.

Sed unue ne estas tiel, ĉar -o ne ĉiam havas la pure atributan signifon, ĉu per malproprasenco (tropeco) kiel ĉe acid-o, flu-o, ĉu per uzo eksprese absoluta en determinitaj konvenciaj kazoj (participo-substantivoj, nomoj de geometria formitaĵoj, „diro“, „opinio“, „penso“ ktp. laŭ la enhavaĵo, post la — senkaraktara — prepozicio k. a.) kaj en kelkaj nepravigitaj kazoj tial pli malaperantaj unuopaj kunmetaĵoj (pag-o por pag-aĵ(o), mono). Oni do ne povas pluformi per acid-ec-a aŭ flu-ad-o.

Plue... ad-o, kio laŭ la nun konsiderata substantiva signifigo de -ad- estas = ... ad(o), laŭ la lingvuzo ne montras simplan ag-on, se... estas verba elemento, sed (tute konforme al la verba signifigo: per pleonasmo) intensigitaĵo (daŭron ktp.) kaj ankaŭ ekz-e terur-ad-i

ne estus = „terur-o-i“ (v. pli supre), teruristi, sed ree = intense (daŭre ktp.) teruri. Same la (ĉe adjektiva signifigo ideo pleonasma) ... ec-a laŭ la lingvuzo havas la (ree klarigeblan per intensa pleonasmo) signifon ... simil(a), kvazaŭ ... a kaj apenaŭ ... o-a, de ... o, tiel ke ind-ec-a signo pli certe estus komprenata kiel digna signo ol kiel „ind-o-a“ signo, signo de ind-o; kvankam ĉe substantiva signifigo de -ec- ankaŭ „patr-o“ = patr-ec(o) [ec = a-o; ĉe adjektiva signifigo (ec = a) patr-ec-o] devus liveri la adjektivan pluformitaĵon patr-ec-a en la signifigo „patr-a-o-a“ = de patreco [aŭ ĉe adjektiva signifigo „patr-ec-o-a“], patr-ec-a pruvo verŝajne en la konceptanto naskus la ideon (bone akordigeblan kun la adjektiva signifigo, v. supre) kvazaŭ patra pruvo kaj ne pruvo de (pri) patreco (patreosto).

Trie estus malebligita la praktike uzita kaj uzinda solvo (rim. 3) de la problemo IIa kaj estas ripetebla, kion ni jam diris sub II3a.

Ni tiras el ĉio ĉi la konkludon, ke estus plej oportune havi apartan ĉiam aplikieblan sufiksajn pluformadilon por -o; por ke oni povu, same kiel esras pri -ec- kaj -ad-, meti tiun en ĉiuj kazoj tute ajte mate anstataŭ la forigata finaĵo, necesus, ke ĝi ne estu nur atributa sed difinita kiel ne pli kaj ne malpli ol pluformadilo de -o. Ni volas rilate tion fari nenajn proponojn; nia ĉefa celo ja estis unue elmontri la aferstaton, la interdependon de kaŭzoj kaj efikoj. Ĉelere ni konfesas, ke la praktiko ankoraŭ ne trudis al nia memoro (kiel kontraŭe okazis pri multaj aliaj solvoj) per la modelo de la naciaj lingvoj aŭ per evidentigo de speciale grandaj superaĵoj lun formon proponieblan; tamen ŝajnas al ni rekomendinde esplori,

ĉu, pro la speciale ofta bezono de adjektivaj pluformitaĵoj, eble la silabo -al- estus konsiderebla por la plenigenda sufiksa funkcio*).

[Kongerne -al-, ni opinias verŝajna, ke tiu sufikso estis enkondukata en idon pro la bone sentata sed ne ĝuste interpretata manko de atributa sufikso de enteco. Almenaŭ nun ĝi tre ofte plenumas ties funkcion: ekz-e la idistoj por „telegraf-o-a“ (telegraf- ĉe ili estas verba) diras „telegraf-al-a“, kiu praktike plene taŭgas; ĉar -al-, difinita kiel „rilata al“, ĉiam supozas la antaŭiron de la ideo de enteco. Sed, pro tiu difino, ĝi ne ĉiam povas anstataŭi la finaĵon -o, tiel ke la idistoj faras la saman ellipson (v. sub 4) kiel multaj esp-istoj, dirante sen-vol-a por senvol-oja kaj kontre-febr-a (kontre = kontraŭ) por kontrefebr-oja, kvankam vol- kaj febr- ĉe ili estas verbaĵ kaj kvankam ili ŝatempe sufiĉe kritikis Esp-on pro formoj kiel sen-depend-a por sendepend-oja, nedependa.]

4. De ellipsoj ĉe kompletigitaj prepoziciaj formitaĵoj ni jam prezentis ekz-ojn preparolante la idistan -al-; alia ekz-o estus kontraŭ-batal-a (ulo) por kontraŭbatal-oja; ĝi korekte signifus kontraŭ-batala, kontraŭ-batalanta. Ellipso ĉe nekompletigitaj prepozicia formitaĵoj estas anstataŭigi per, al kiu oni donas la signifon „anstataŭi-igi“, anstataŭ-at-igi per (igi anstataŭata de), kvankam, analogie al antaŭ-igi, en-igi ktp., ĝi devus esti sinonimo de substifil. Ellipse plue por

stat-ali(1) (G verstaatlichlen *) ne malmaltaj esp-istoj uzas stat-igi, kio povus esti nur igit stat(o), dum por „soci-a-igi“ ili, havante apartan adiektivon social(a) = soci-a, evitas la ellipson soci igi per la formo social-igi*). Ankaŭ ĉe postsekvado de radikoj -o estas sen pravigo ellasata ĉe de la plej bonaj aŭtoroj; oni trovas rapidmezurilo (ankaŭ rapid-ec-mezurilo ne estas al-lasebla ĉe adjektiva klasifiko de -ec) por rapido-mezurilo, mezurilo de (la) rapido, kvankam la unua formo ja povas montri nur rapide funkcion mezurilon.

Speciale rigardi ni deziras la ellipsojn de -o antaŭ postsekvanta -a. Ne tiujn ĉe antaŭiro de same adiektiva vortelemento antaŭ -o; ĉar almenaŭ tiujn, ŝajnas al ni, ĉu tiuj konsciigos kaj tial evitos ĉe la unua ekprovo; tamen, ĉe Verax oni povas konatiĝi kun „varm-al“ (tio estu „varm-o-aĵ“ aŭ termikal) „fenomenoj“ kaj kun „pilo-elektro-varma“, per kio estas celata ne pilo, varma per elektro, sed elektro, varm-oja, t. e. varmoelektra, termoelektra. Estas la ellipso ĉe antaŭiro de verba vortelemento, kiuj estas speciale pritraktendaj. Pri tio, ke ĉiuj ili povas pure teorie pravigi dirante, ke la plej ĝenerala laŭelementa signifigo de la kunmetaĵoj tiel naskataj estas „havanta kvaliton karakterizatan per la ago ... i“ kaj ke tio ne estas io alia ol „rilata al (la) ... o“; kaj tio ankaŭ refutus la rezonon, ke „rilata al“ supozas la antaŭiron de la ideo de

*) Estas interese, ke en la germana lingvo estas ĝuste male: kvankam uzante la kompletan verstaatlichlen la germanoj por „soci-a-igi“ diras ellipse vergesellschaften (por ni) same orelofendan kiel la esp-a analogiaj stat-igi.

*) Laŭ niaj intertempe okazintaj esploroj en la unua loko inter la proponieblaj sufiksoj sin rangas la rusa -ov- (Altiore noto de la 20.10.)

La festo estis finita per varma parolado de s-o Josep Grau Casas, kiu anstataŭis s-on Kühn en la prezida rolo.

Resume: Brila festo, bone organizita kaj kies rememoro daŭros en la penso de ĉiuj, kiuj feliĉe povis ĝin partopreni.

Oficiala Festeno.

Sub prezido de f-ino Teresa Bartino, la belega regino de la Floraj Ludoj, de la Girona urbestro kaj de la prezidanto de K. E. F. okazis la oficiala festeno ĉeestata de ĉirkaŭ 100 gesamideanoj.

Ce la tustoj levis la ĉampanan pokalon kelkaj el la ĉeestantoj, kaj la festo finiĝis meze de nepriskribebla entuziasmo.


Post la festeno la ĉeestantoj partoprenis la balon dediĉatan al la kongresanoj, kiun la amantoj de Terpsihoro ĝuis ĝis la unuaj horoj de la mateno.

Lundo, 17. Okt.

Postkongresaj ekskursoj okazis dum tiu ĉi tago al Empuries kaj Banyoles, ambaŭ multe ĉeestitaj kaj bone sukcesintaj.

La IX-a Kongreso de Kataluna Eperantista Federacio do sendube estis unu el la plej brilaj okazintaĵoj, kaj ĝiaj organizantoj meritas sinceran aplaudon kaj dankon de la kataluna eperantistaro. **Ĉeestinto.**

Rim. de Red. La kvar klišaĵoj pri Girona estas komplete disponigitaj al ni de la katalunaj samideanoj, same fotografo pri la "regino", kiun ni publikigos nur en nia venonta numero, ĉar la klišofabriko ne liveris ĝustatempe la klišaĵojn.



Vidaĵo de Girona kun la Katedralo kaj Preĝejo de Sant Felu.

Por „Esperanta Ligilo.“

La speciala n-o de ET dediĉita al „Esperanta Ligilo“ jam estigis bonan rezulton. Alvenis ĝis nun 28 pliaj donacoj, tiel ke en nia kazo por „Esp. Ligilo“ troviĝas nun: 86 francaj frankoj, 12 italaĵoj, 10 hung. kronoj, 5 svisaj frankoj, kaj 4 1/2 holandaj guldenoj, kiuj laŭ la nuna kurzo egalvaloras al ĉ. 2700 germanaj markoj. Krom tio ni ricevis 2529 germanaj markoj, tiel ke la tuta bonhavo de „Esp. Ligilo“ ĉe ni nun sumiĝas je pli ol 5000 germanaj markoj. Jen la nomoj de la novaj donacintoj:

29. G. Gila, Locarno 5 sv. fk., 30. D-ro W. Döhler, Riesa 5 gmk., 31. F-ino Gaby Garcia, 88 rue d'Arzew, Oran (Afriko) 10 fr. fk., 32. Esp. Grupo Hattingen 40 gmk., 33. Fr. Hahn, Perleberg 10 gmk., 34. Adolf Winkler, Würzburg 10 gmk., 35. J. F. Fischer, St. Gallen 50 gmk., 36. H. B., Düsseldorf 11 gmk., 37. Prof. A. Lacalendola, Bari 10 lroj, 38. P. Küttner, Mannheim 8 gmk., 39. H. van Donlck, Antwerpen 5 gmk., 40. Elise Jacobs, Flensburg 7 gmk., 41. Esp. Grupo „Merkurio“, Rotterdam 825 gmk., 42. Ch. Brunet, Bordeaux 1 fr. fk., 43. W. Knopf, Beuthen O. S. 10 gmk., 44. Oscar Bünemann, Hamburg-Fuhls-

blüttel 20 gmk., 45. Edwin Haschke, Breslau 20 gmk., 46. Esp. Grupo „Lemana Stelo“, Montreux 200 gmk., 47. Kolektita de s-ano Kueper inter la kolegoj de la tel. oficejo en Düsseldorf 12 gmk., 48. A. Ploussu, Grenoble 45 gmk., 49. „Bilbotar bat“ 5 fr. fk., 50. Walter Lippmann, Dresden 5 gmk., 51. Fidia Cesarini, Potenza 2 1/2 lroj, 52. Karl Seidel, Crimmitschau 10 gmk., 53. Grupo „Beziersa Stelo“, Beziers 20 fr. fk., 54. W. Lühdemann, Hamburg 10 gmk., 55. Germ. Lab. Esp. Asocio, loka grupo Breslau 50 gmk., 56. D-ro Austerlitz, Bardiow 40 gmk.

Ni rimarkigas, ke kelkajn donacajn sumetojn ni devis ŝanĝi je germana mono. pro tio, ke ili estis krompago de abono aŭ anonco, ekzemple se lu donaciis 1/2 liron aŭ 2 ŝilingojn, de kiuj ne ekzistas ŝtataj monbiletoj.

Esperanto en Pola lando.

Bydgoszcz, 1. nov. 1921.

Dua ĉirkulero de EAP.

Sentante la efektivan mankon de la organizo inter la samideanoj de Polujo, la Bydgoszcz'a esperantistaro fondis la 1. nov. 1921

Esperanto-Asocio de Polujo (EAP)

kaj samtempe starigis la „Fundamentan artikolon“, t. e. la bazon, sur kiu EAP laboras. La artikolo tekstas jene:

La „Esperanto-Asocio de Polujo“ estas unuiĝo de ĉiuj esp. grupoj kaj izolaj esperantistoj troviĝantaj en Polujo. Ĝi estas organizo nacie, religie kaj politike neŭtrala. Ĝi celas 1. arigi ĉiujn esperantistojn de Polujo, 2. per komunaj fortoj labori por la plifortigo de Esperanto bazita sur la „Fundamento“ de d-ro L. L. Zamenhof en Polujo.

Ĉi-supra „Fundamenta artikolo“ provizore anstataŭos pli detalan regularon. Ni ankoraŭ unufoje subsirekas la tute neŭtralan laŭ nacieco, religio kaj politiko karakteron de la asocio.

La provizora sidejo de EAP estas Bydgoszcz. Kordeckiego 1 a, al kiu adreso bonvolu sendi ĉiujn skribaĵojn.

Ni petas ĉiujn esp. grupojn kaj izolulojn de Polujo, kiuj konsentas kun niaj ĉefaj opinioj ententataj en la „Fundamenta artikolo“, interrilati kaj — se eble — tuj aliĝi al EAP.

Ĉar pro la nunaj ĉirkaŭstancoj okazigo de konferenco por tuta Polujo ne estas ebla, ni tre petas la esp. grupojn interrilati kun ni skribe. Al ĉiuj ni donos plej volonte respondon.

La statutoj estas prilaborataj kaj dissendotaj post unu monato al ĉiuj aliĝintaj grupoj kaj izoluloj.

La estraro konsistas provizore el Bydgoszcz'aj samideanoj, por ebligi la tujan funkciadon de la asocio. Pli poste ĉiuj aliĝintaj grupoj kaj izoluloj elektos.

La provizora estraro: prez. prof. L. Kronenberg; vicprez. redaktoro A. Pankratz; sek. Prengel, stud.; vicsek. Edm. Fethke, presisto; kas. Kopp, stud. jur.; vickas. Smura.

La oficiala organo de EAP estas „Tagiĝo“, monata revuet'o eldonata de EAP kaj PES (Pola Esp. Servo).

La aranĝantoj:

Chmielewski	Pankratz	Szulc	Strelczyk
por poloj	por germanoj	por hebreoj	por rusoj
Kronenberg	Edm. Fethke	Gawronski-Wiener	
por homaranoj	por katolikoj	por socialistoj	
Malycha	Szulc	Prengel	
por militistoj	por UEA	por PES	

Persone subskribis ĉi-supran komunikon:

J. Luszig	Strelczyk
por Esp. Soc. Kalisz	por Esp. Grupo Turek
Jan Bratkowski	Pankratz
por Esp. Grupo Wyrzynsk-Osiek	por estraro de EAP.

[en|dorm-ig(i)], dormigi enigante (t. e. dormigante enigi) en transan stacion, analogie al en-lul(i).

Speciale grava tio ree estas por la verbo-substantivo-adjektivoj. Ni supre atentigis, ke la signifo . . . a (. . . = verbo) = . . . anta estas nur malvastigaĵo de la resp-a signifo . . . o-a; jam per tio elipso tre ofte estas ebla, ĉar tre ofte oni povas preni la specialan por la ĝenerala ideo. Komp-u ekz-e la germanan Glanz-papier (laŭvorte bril-o-papero) kun ĝia esp-a tradukaĵo bril-a (precize: glacea) papero aŭ Erbauungs-buch (laŭvorte edific-o-libro) kun edific-o libro. Sed tiuj kazoj de ebla elipso ankoraŭ multe pliigas la konata fenomenon, ke ĉiuj lingvoj transportas la kvaliton de homo al agoj aŭ aliaĵoj al li rilatantaj; ke oni ekz-e nomas inteligent-aj tagoj la tagojn, en kiuj li estas speciale inteligenta (precize: „intelligent-o-aj“, de intelligent-o aŭ malsag-a fero, malsagaĵo agon ĉe (aŭ eĉ: per) kiu homo sin montris malsaga. Pripensante tion oni povas ekz-e diri vol-a por „vol-o-a“, volita (proksimume, Gwillkür-lich) ago; ankaŭ aprob-a rideto ja ne estas mem aprobanta en la plej vera senco, sed estas nur rideto de aprob-o.

Resumo pri II kaj III.

Dum la interelementaj rilatoj de la sufiksoj al la antaŭranta vortoduono ordinare estas sufiĉe speciale antaŭfiksita por ĉiuj kazoj, la du eblaj neprimitivaj finaĵoj-kunmetaĵoj de vorto lasas al la konvencia (ĉu centra, ĉu „lingvuoz-a“) pokaza fikso de la preciza rezultanta signifo (fikso de la interelementa rilato kaj malvastigo de la limsignifio) relative multe da libere. Oni kune kun la elementa signifo havas maksimume tri fundamentajn signifojn, kiuj ideo devas konserviĝi tra la tuta vortofamilio, en la ceteraj membroj ĝenerale konstruebla, sen gravaj novaj fiksoj. Por ke tion ne malhelpu la forma flanko de la lingvo, estas

Komerco.

Esperanto kaj la Foiroj.

„Esperanto“ raportas: La foiro de Padova proponis kunlaboron al la foiro de Praha. Ĉi tiu akceptis per kontrakto, en kiu estas notiite, ke Esperanto estas difinita kiel lingvo por la korespondado inter la du foiroj. La aliaj punktoj koncernas propagandon, komercan servon ktp.

Esperanto instruata oficiale en la urba komerca lernejo en Elbing.

Sekve de klopodoj de s-o Haedicke, direktoro de la urba komerca lernejo kaj de s-o H. Greff, kemiisto, Esperanto estas instruata en la urba komerca lernejo de Elbing, Germ. (Okcidenta Prus.) dum la vesperkursoj. S-o Greff gvidas la kurson, je kiu partoprenas pli ol 50 personoj.

Urba lernejo en Ĉervený Kostelec

(Ĉeĥoslovakio) enkondukis la instruadon de Esperanto en la urban du-klasan komercan lernejon. Al 42 ĝelernantoj instruas instruisto Frant. Baliček.

Lernejo.

Internacia Konferenco pri Instruado de Esperanto.

U. — La „Institut Jean-Jacques Rousseau“ en Genève (lernejo por edukaj sciencoj), aligita al la Universitato decidis kunvoki dum proksima printempo internacian konferencan, kiu diskutos pri la spertoj ĝis nun faritaj kun la instruado de Esperanto en diverslandaj lernejoj, kaj kiu ankaŭ okupos sin pri ĝeneralaĵoj de tiu instruado. La instituto estas direktata de s-o Pierre Bovet, universitata profesoro.

Publika kunveno pri instruado de Esperanto en lernejoj.

U. — Granda publika kunveno, kunvokita la 1. nov. de la „Pedagogia Societo“, de la „Institut Jean-Jacques Rousseau“ kaj de la „Unuiĝo de la Instruistoj“, estis dediĉita al Esperanto en la lernejoj. Post paroladoj de s-oj Malche, Edmond Privat kaj Pierre Bovet, la kunveno voĉdonis rezolucion, gratulante la Instruadon Departementon kaj dezirante plenan sukceson al la oficiala eksperimento, nun farata en la lernejoj de Genève, kaj al progresado de esp. instruado en ĉiuj lernejoj de la mondo.

Polico.

En Wiesbaden, Germ., 8 policianoj kuniĝis je esp. grupeto, kiu certe pligrandiĝos per la partoprenantoj de fervore vizitata kurso, kiu nun havas lokon en la policejo de Wiesbaden. Post varma rekomendo de la ĉi tiea policedestro sin anoncis 26 kolegoj al studado de Esperanto. Por kuragi la komencantojn kaj konvinki la skeptikulojn, la alsendo de poŝtkartoj aŭ leteroj estas dezirata. Adreso: J. Frimberger, Wiesbaden, Dohheimerstr. 110, I.

Laboristoj.

GLEA.

Ni ĉerpas el „Der Arbeiter-Esperantist“ (La Laborista Esperantisto): Novaj lab. grupoj en Wittenberge, Sigmara kaj Peine. La Asocia Kongreso okazos je Pasko 1922 en Düsseldorf. El la lab. grupoj: Berlin (4 kursoj, artikoloj en la socialistaj ĵurnaloj), Bitterfeld (kurso), Breslau (5 kursoj por komencantoj), Gera (paroladoj) kurso kun 40 p.), Leipzig (12 kursoj kun 300 p.), Nürnberg paroladoj, kurso kun 45 p.), Worms (kurso). Preskaŭ ĉiuj kursoj estis rezulto de propagand-semajno okazigita de la Asocio.

bezonata la eblo de nelimita pluformado. Tiam eblajon ni trovis nur unu: la adjektivan resp-e verban signifon de -ec- kaj -ad- kaj la enkondukon de sufiksa pluformadilo por -o; eblaĵo ne ĉiam taŭga kaj ankaŭ tute ne tiel praktike kaj teorie kontentiga estus la substantiva signifigo de -ec- kaj -ad- ĉe samtempa intervortita konservo de la finaĵoj. Por unu el la du eblaĵoj oni devos decidiĝi. Ĉar ankaŭ la ĥoleron oni ne forigis lertigante en la kuracado de la unuopaj malsanuloj, sed konstruante novajn akvokondukajn kaj tiel ekstermante la ĝermojn de la maldobonaĵo. 29. 6. 21.

Tekniko.

Nova lokomotivtipo konstruita en Svedujo.

Ce la fame konata fabriko Ljungström, Svedujo, oni konstruis lokomotivon de tute nova tipo. Unue ĝi havas turbinojn, due ĝi densigas la vaporon. Dum multaj jaroj inĝenieroj el multaj landoj prilaboris tiun ideon. La preferoj de la nova lokomotivtipo konsistas en la bonekonomia uzo de ĝi rilate al la ordinariaj lokomotivoj, kaj plue en ĝia senbrueco. Pro la kostosparo oni certe komencos uzi la novajn turbinlokomotivojn anstataŭ la aliaj.

Henning Halldor.

Interesa eltrovaĵo.

La direkto de poŝtoj kaj telegrafoj en Praha la 1. nov. invitis reprezentantojn de ĵurnaloj, bankoj, komercaj rondoj kaj oficoj kaj prezentis al ili interesan eltrovaĵon en telefona fako, tiel nomatan „Telegrafon“. Ĝi estas kombino de gramofono kun telefono. Celo de tiu ĉi eltrovaĵo estas akceptadi kaj skribadi aŭtomate telefonajn sciigojn ankaŭ tiam, kiam ĉe la aparato neniu

Skoltoj.

En Boulder, Colo., Usono, s-o Buchheim gvidas klason de 12 knaboskoltoj je la Univ. de Colo. Y. M. C. A.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

El Franclando.

La komerca, industria kaj terkultura asocio de Lyon kaj de la regiono (adreso: A. C. I. A., Lyon, 10 rue des Marronniers) akceptis Esperanton en sian programon. — En Gaillac (Tarn) s-o Roy, kolegia profesoro, gvidas kurson. — La vintro-kunvenoj de la Paris'a grupo malfermiĝis en la Sorbonne la 4. nov. S-oj Rollet de l'Isle kaj Archdeacon parolis pri la sukcesoj de Esperanto. La 3. nov. s-o Cart faris propagandan paroladon sub la prezido de s-o Rollet de l'Isle en Aulnay apud Paris, laŭ la invito de tiea s-ano Couteau, direktoro de ripozdomo por maljunuloj (kies frato, deputito, estas esperantisto); ĉeestis la urbestro kaj la vicurbestro. — En Nemours (Seine et Marne) fondiĝis esp. grupo, dank' al klopodoj de s-o Delanoue, bankdirektoro.

Propagando inter studentoj.

La 30. okt. trapasits Beziere's (Franc.) ĉ. 150 diverslandaj studentoj, kiuj veturis al Montpellier (ĉefurbo de l' departemento Herault), kie okazis de l' 700-a datreveno de la fondo de l' Universitato havis lokon kongreso de studentoj. Dum la vojaĝantoj trinkis kafon en nia plej granda kafejo, deko da junaj esperantistoj disdonis al ĉiuj el ili belan dianon kaj ruĝan broŝuron (francan esp. gramatiketon por propagando). La studentoj akceptis niajn junulinojn per tondrega aplaŭdado, laŭtaktaj aplaŭdoj, hip, hip, hura! kaj . . . ili slavice disdonis ion . . . kisojn, post insistita petado kaj post permeso de l' urbestro, kiu estas nia honora prezidanto. — Senpagaj kursoj komencis por infanoj, kun premioj de entute 300 fk.; aliaj kursoj ĉe la Laborborso, ĉe la Komerclernejo kaj por hispanoj. (R-o.)

Britlando.

„The British Esperantist“ raportas pri jenaj lokoj: Ashton-under-Lyne (grupfondo), Bristol (kurso), Gillingham (kurso), Glasgow (kurso kun 60 knaboj ĉe Blairhill lernejo Coatbridge). Leith (grupkurso kaj 2 kursoj ĉe Teknika Kolegio), Coventry (konferenco de „Mezlanda Esp. Federacio“, kurso), Sheffield (parolado de s-o Merchant). En London multaj kursoj en la diversaj kvartaloj. La 17. sept. okazis fondo de Sud-Orienta Federacio, la 24.-25. la XVI-a Kongreso de Skotaj Esperantistoj en Dunfermline.

Italio.

„L' Esperanto“ raportas pri jenaj lokoj: Carbonara Scivia (kurso), Fossombrone (kurso, grupfondo), Milano (propaganda promenado al Como, 2 kursoj en Greco Milanese), S. Giovanni Valdarno (seminarioj de l' Seminario de Fiesole lernas Esp.), Terni (parolado de s-o Ghez), Treviso (kurso, gazetartikoloj), Venezia (kursoj publikaj kaj specialaj por katolikaj skoltoj), Verona (kurso).

Jugoslavio.

„La Provo“ raportas pri jenaj lokoj: Zagreb (po 1 kurso por komencantoj, progresintoj kaj poŝtistoj), Split (lumbilda reklamo en kinematografo, parolado kurso kun 80 p.), Mostar (konversacia kurso por 18 p.), Beograd (artikolo en komerca gazeto „Trgovinski Glasnik“).

En Usono

okazas esp. kursoj en Washington, Boulder (por knaboskoltoj), Erie (ĉe Pola Studento Soc.) kaj du (komenca kaj progresiga) en Boston.

ĉeestas. Tiu ĉi eltrovaĵo estas gravega por ĵurnalistoj, komercistoj ktp. Praktike ĝi estos uzata post mallonga tempo en Praha kaj en grandaj urboj de la ĉeĥoslovaka respubliko.

Tradukis Josef Paša.

Ekkredis mi . . .

(Tomboŝonoj 1914.)

Kiam la Majstron mi al ter' redonis
Kaj porfunebre adiaŭis lin,
El tombo kvazaŭ iu voko sonis
Mistera, milda — mi ekaŭdis ĝin.

Voko de l' kvazaŭ forfluganta koro,
Liberiĝinta de la korpo-ĉen',
Trasonis kiel tomba petoploro,
Kiele lasta, adiaŭa ben'.

Mi ĝin aŭskultis, la misteran sonon,
La fortigantan eĉe ĉiam pli,
Mi ĝin aŭskultis kiel la ordonon
De l' instruisto al lernantoj — ni.

„Frato-amiko! — sonis la ordono —
„Standardon levu kaj en bona hor'
„Pekan homaron por eterna bono
„Sur ĝustan vojon elkonduku for!“

„For la malpaco, for la ambicla,
„El via koro for elŝiru ĝin!
„For ŝovinismo, for la religia!
„Esperantistoj — unuigu vin!“

Kaj kiam staris ĉiuj kapokline
Super la freŝa tombo are ni,
Ke verdsteloj venkos laŭdestine —
Ekkredis mi . . .



La Laborista Esp. Grupo Essen
(Germ.) nun gvidas 6 kursojn por plenkreskuloj, 3 en popola altlernejo kaj 3 por infanoj, entute ĉ. 400 partoprenantoj. Krom tio en novembro komencos kursoj en Gladbeck kaj Steele (ĉirkaŭaĵo de Essen). Adreso: Willy Meyer, sekr., Essen-Ruhr, Lindemannstr. 1.

En Friedland (distr. Waldenburg), Silezio
s-o Alois Weiss, studento de Breslau'a Universitato, faris paroladon, gvidis kurson kun 40 personoj, inter ili 12 gelnstruistoj, plue poŝtfofcistoj ktp., kaj fondis grupon.

Propagando dum fervoja vojaĝo.
Dum fervoja vojaĝo de Bydgoszcz al T... s-o B. Strelczyk komencis propagandon por Esperanto. Klariginte ĉiujn bonajn ecojn de Esperanto al siaj kunvojaĝantoj, el kiuj multaj aŭdis nur unuan fojon pri Esperanto, kaj montrinte malgrandan lernolibron de prof. Kronenberg, ili povis vendi ĉ. 30 lernolibrojn. Samtempe oni invitis lin por gvidi esp. kurson en Gompolew kaj Kolo.

Adiaŭan feston
aranĝis la esp. grupo de Budapeŝt la 1. nov. en kafejo Kovacs honore al la malproksimaj gastoj de insulo Kuba, ges-oj De Villa. Kiam fine s-o De Villa dankis la honorojn kaj gastamecon, li akcentis, ke per Esperanto li sentis sin kvazaŭ en amika rondo dum la semajnoj pasigitaj en Budapeŝt kaj ke li ekamis la urbon kaj ĝian loĝataron, havante nun jam tute alian opinion pri Hungarujo ol antaŭ la alveno, kiam li laŭ eksterlandaj rakontoj ricevis tute kontraŭan imagon pri tiu teritorio. Per Esperanto li nun iom ekkonis la veron kaj helpas ĝin disvastiĝi en eksterlando, kie Hungarujo havas malmultajn amikojn kaj konantojn.

Esp. Klubo Palma de Mallorca
malfermis 3 esp. kursojn kun 32 gelnantoj.

Alvokoj.

Al la esperantistaro de ĉiuj mobilizantaj ŝtatoj.
La esperantistoj servantaj ĉe armeo ne devas ĉesi labori por Esperanto, ne devas ĉesi propagandi kaj verbadi, ĉe sia roto, kompanio, devas porti la verdan stelon, devas rilati kun la esp. grupoj en sia garnizonloko. Dejarante gardon en solecaj vilaĝetoj, ili devas kunvoki la izolulojn, interesigi la amikojn de Esperanto al aktiva kunlaboro. Kia medio estiĝos por soldato-esperantistoj!

Sed solaj ili ne estas kapablaj por tio. La hejme restantoj devas subteni iliajn penadojn, la esp. organizoj devas kolekti la adresojn de iliaj ordoj ĉe la armeo. Neniame la organizoj, neniame la esperantistoj devas perdi la kontakton kun siaj

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.
Tradukita laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro
Maria Sidlovskaĵa.
(40-a daŭrigo.)

La sama sorto trafis la plej proksime starantan policanon, kaj post kelke da sekundoj la grandega sovaĝa viro, strange vestita, malpura, vilhara, sola renversis la unuan vicon de la policanaro de Nov-Jorko. Unue sekvis lian ekzemplon la italoj kun brulantaj okuloj kaj laŭtaj krioj. La amerikanoj restis apud la standardo, kie s-ro Hompers senrezultale krevigis al si la bruston, alvokante al ordo, montrante al unu el la surskriboj de la standardo: „ordo, indeco, disciplino.“

Post nelonge ĉiuj policanoj estis renversitaj, kaj la homamaso sin jetis sur la placon.

Unu momento estis, kiam ŝajne la urbeĝo ek-tremis sub la influo de tio, kio fariĝis apud la Centra Parko. La forirantaj vagonoj ekrapidis for de tiu loko, la alvenantaj haltis hezitante, la leviloj plu ne laboris, la konstrulaboristoj ĉesis rampi tien kaj reen. Ili scivole kaj plejate observadis de supre la homamason, kiu ĵus renversis la policanojn kaj nun estis preta sin jeti trans la placon kontraŭ plej proksime starantaj konstruaĵoj de la apudaj stratoj.

Sed tio daŭris ne pli longe ol unu momenton. La placo troviĝis en la manoj de la homamaso, sed la homamaso tute ne sciis, kion fari kun la placo! La plej multaj restis apud la standardo, kaj iom post iom la kapo de la proceslo, ser-

sameanoj. Flugfolioj kaj gazetoj estu multnombre sendataj por propagandceloj inter la militistaro. La grupoj kunvoku la fremdajn esperantistojn en siaj urboj.

Jen estas okazo, sen multaj vojaĝelspezoj konatiĝi kun fremdaj sameanoj kaj helpi al ili. Ekzemple, ni nordbohemoj ne havus okazon viziti la esperantistojn en Slovakio. Nun la ŝtato pagas la vojaĝelspezojn; eĉ la mizero helpas al ni.

Fr. M., Reichenberg.

Al ĉiulandaj sameanoj!

Litova kultministerio prilaboras nun planon por reformo de ĉiuj landoj. Por tiu celo ĝi bezonas regularojn de lernejoj en ĉiuj landoj. Ni, esperantistoj, zorgante pri deviga enkonduko de Esperanto en ĉiujn lernejojn, penas konvinki nian kultministerion pri disvastiĝo kaj praktika uzebleco de Esperanto, dirante, ke per Esperanto ĝi plej rapide kolektos la necesan materialon. Por ke nia diro veruĝu, ni petas sameanojn en ĉiuj landoj, bonvole sendi al subskribinto regularojn de sialandaj lernejoj en lingvoj Esperanto, germana aŭ franca. Sendkostoj estos rekompencataj per iu en Litovio aperinta esp. eldonaĵo.

J. Mačernis,

„Saules“ mokytoju seminarija,
Kaunas (Kovno), Litovio.

Parolejo.

103. Donu la datojn!

Por la propagandistoj de Esperanto estas tre valore, scii la datojn de niaj grandaj sukcesoj. En oficialaj pet-skrivoj, propagandaj broŝuroj ktp. tute akurate kaj ĉiam kontroleblaj informoj estas necesaj. Tia akurateco postulas ankaŭ datojn.

Ni ja scias, ke 21 (nun 25) membroj de la Paris'a Scienca Akademio manifestis por Esperanto, ni ankaŭ scias, ke la Kongreso de la Franca Asocio por Akcelado de la Sciencoj en Rouen voĉdonis por Esperanto — sed kiam?

Eble francaj legantoj informos la red. de ET pri tio, kaj la aliaj kunlaborantoj ne nur de ET, sed de ĉiuj esp. gazetoj, estonte sekvos tiun konsilon.

104. Ni estu precizaj!

Kelkfoje mi legis en alilandaj propagandaj artikoloj, ke la Franca Akademio de Sciencoj voĉdonis por Esperanto. La fakto estas, ke 25 akademianoj (el 70) subskribis deziresprimon por Esperanto, individue demandita. Do, atentu!

Recenzejo.

(Unuope senditajn librojn ni mencias, duoble senditajn ni recenzas. Monataj esp. gazetoj sendu du ekzemplerojn interŝanĝe kontraŭ unu ekz. de nia semajna ĵurnalo.)

LIBROJ.

HANDLEDNING I ESPERANTO. Lernogvidanto de Esperanto por svedoj. Verkita de Vilho Seitilä kaj K. Sev. Ahonius. 64 pĝ. 16:24 cm. Helsinko 1921. Mendebila ĉe O/Y Movado A/B, Helsinki, Kasarminkatu 20. Prezo karton. 4 fmk.

penite rampanta jam al la urbeĝo, ree alirigis al ĝia korpo.

Post rapida interkonsilio la gvidantoj decidis, ke la meeting'o estas „rompita“, kaj rapide akceptinte la rezolucion, protestantan kontraŭ la agado de la policanaro, oni procesle ekmarŝis returnen.

Antaŭe, kvazaŭ nenio okazis, enviciĝis la dungita orkestro, kaj polva nubo denove akompanis la muzikistojn trans la placon. Ĝin sekvis la ree kuniĝintaj vicoj da policanoj, kuraĝige svingante siajn bastonojn kaj rapidigante la postrestantajn.

Post duonhoro la parko senhomiĝis, la leviloj ree laboris, la konstrulaboristoj ree moviĝis preskaŭ sub la nuboj sur sia trabaro, ree ruliĝis vagonoj, kaj la nun preveturantaj Novjorkanoj nur el vesperaj gazetoj ekscitis pri tio, kio ĉi tie okazis antaŭ duonhoro. Nur gardistoj vagadis ĉirkaŭ la fontano, skuante la kapojn kaj grumbliante pro la difektiita herbaĵo.

XXIV.

Dum kelke da tagoj la gazetoj de Nov-Jorko dank' al la Loziŝcano Mateo laboris tre vigle. Por lia honoro la tipografaj maŝinoj faris centmilojn da turno, centoj da raportistoj trakturadis ĉiujn stratojn, kolektante novaĵojn pri Mateo, kaj sur la placon antaŭ la grandega konstruaĵo de la gazeto „World“, „Tribune“, „Sun“, „Herald“ tutaj centoj da novebakitaj gazetaj buboj ariĝis. Sur unu el tiuj konstruaĵoj Dima, kiu la tutan tagon vagadis tra la stratoj de la urbo, esperante renkonti la kamaradon, vidis tabulon kun jena anonoo:

Ni jam konis ĉi tiun libron sub la fina titolo: Esperanton Oplaskeloapas, lernolibro por infanoj; la jenan tradukon prilaboris lektoro Ahonius. La libro enhavas en tri partoj la kompletan gramatikon de Esp. kaj multajn tradukezercojn kun ŝlosilo. Tial ĝi estas uzebla por la meminstruado. Mallonga vortlisto de la gvidolibro estas modele aranĝita kaj klarigita; la verkinto faciligis ĉi-maniere la lernadon al la studento. Ni rekomendas la libron al ĉiu svedlingvano, kiu intencas lerni Esp.

(G. Ajul.)

ESPERANTA LEGOLIBRO de Vilho Seitilä. Tria eldono ilustrita. 112 pĝ. 14:21 cm. Eldona Akcia Societo Otava, Helsinko, Finnlando. 1921. Mendebila ĉe O/Y Movado A/B, Helsinki, Kasarminkatu 20. Prezo karton. 16 fmk.

Oni ne povas paroli pri tiu ĉi bonega legolibro ne menciante la lernogvidanton: Handlednig i Esperanto. Ĉar ambaŭ estas interligitaj tiamaniere, ke la unua estas uzota ĉe elementa instruado paralele kun la dua. La gramatikaj reguloj, kiujn la zorge gradigitaj libro enhavas, aperas iom post iom kiel ekzemploj kuŝitaj en la teksto. Ĝi ne konsistas el sendependaj izolaj frazoj, sed el fabeloj, dialogoj, prozaĵoj, poemoj kaj rakontoj, kiuj tuj de la komenco kaptas la intereson de la lernanto. La plej granda parto de la legoj estas elektita el konvena literaturo Esperanta. Parte la legolibro estas verkita en la celo instrui ne nur la lingvon Esp., sed ankaŭ esperantismon. La materialo de ĉi tiu tria eldono estas tre aktuala montrante la nunan staton de nia movado Kelkaj bildoj el Finnlando k. a. ornamas la libron, kiu per sia boneco rekomendas sin mem. Niaj ŝnag sameanoj danku a-on Seitilä pro lia valora laboro.

(G. Ajul.)

GAZETOJ.

AMERIKA ESPERANTISTO. Okt. Raporto pri la XIII-a. — Kroniko, ktp. BIZANTIO. Sept. Konstantinopolo, Péra, Tepé-Bachi 89. 19:28 cm. 20 pĝ. kaj kovrilo.

Nova esp. revuo kun interesaj artikoloj en esperanta, greka kaj franca lingvoj. Esperable tiu bona revuo povos daŭre ekzistadi kaj forte antaŭenpuŝi nian movadon en la sudbalkana kaj malgrandazia landoj. Bedaŭrinde ni ne ricevis la du unuajn numerojn. DER ARBEITER-ESPERANTIST. Nov. ESPERANTISTA JUNULARO. Bougé (Maine-et-Loire), Franci. Julio-sept. Of. organo de Univerŝala Esp. Asocio Junulara.

ESPERANTO. Nov. Esperanto en lernejoj; Esp. de la Ligo de Naĉoj (kun portreto de Lord Robert Cecil) kaj la cetera intereso enhavo

INTERNACIA KOMERCA REVUO. Sept.-okt. Adreso: Zürich, Svizl., Centra poŝtforo 6104. Esp. de Ligo de Naĉoj, kaj la faka enhavo.

KAMARADO. N-o 1. Spaga hektograflita cirkulero kun 1 paĝa aldono, sendita de ĉ. SATanoj.

LA INTERŜANĜO (L' Echange), sept. Adreso: 5 rue du Capus, Béziers, Franc.

52paĝa bonpapera revuo en franca kaj esp. lingvoj kun ĉarmaj ilustraĵoj. Speciale intereso por ŝtateistoj.

LA PROVO. N-o 1. Hektograflita. Adreso: Zagreb, Jugoslavio. Stalitatkejo, D-ro D. Maruzzi.

LE MONDE ESPERANTISTE. Sept.-okt. L' ESPERANTO. Okt.

Kun multaj, parte tre interesaj artikoloj. 53 paĝoj kaj kovrilo.

THE BRITISH ESPERANTIST. Nov.

Gazetaro.

Auerbacher Zeitung, Auerbach, Germ., 28. 10. 6. 11. (Esp. Angulo.)

Vogtländischer Anzeiger und Tageblatt, Plauen, Germ., 6. 11. (Noto.)

Bremer Nachrichten, Bremen, Germ., 2. 11. (Sporto kaj Esperanto.)

Essener Volkszeitung, Essen, Germ., 28. 10. (Noto.)

Internationale P.T.T., Wien, Aŭstrio, okt. (La Mondhelplingvo Esperanto, de poŝtdir. O. Rieck.)

Le Journal, Paris, 31. 9. (En artikolo pri la kultura signifo de latina lingvo, s-o Dutell parolas pri la favora rilato al Esp. de francaj komercaj ĉambroj.)

Robotnik Slaaki, Frysztat, Rynek I, 84. Organo de la pola socialista partio en Ĉeĥoslovakio. N-oj 200, 205, 206, 208, 218 kaj 225 enhavas artikolojn pri Esp.

Robotnik, Warszawa, Pol., n-o 394. (Artikolo.)

Trybuna, Warszawa (?), 22. 10. (Artikolo.)

NEDERLANDO.

La artikolon „La agado de la Internacia Labora Oficejo“ enhavis, krom la jam nomita, la sekv. ĵurnaloj:

F. L. ten Cate, Brinkstraat, Hengelo

Provinciale Courant, Groningen

Leeuwarder Courant, Leeuwarden

Bornsche Courant, Born.

Nieuwe Hengelosche Courant de 22. 10. enhavis 1/2-kolonan artikolon pri Esperanto.

Sovaĝulo en Nov-Jorko.

Okazintaĵo dum la meeting'o de senlaboruloj.

Ĉu kafro aŭ patagoniano, aŭ slavo?

Pli forta ol la policano Hopkins.

Minaco al la civilizacio!

Rompo de la leĝoj de la lando.

Ni donos la portreton de la sovaĝulo,

kio morfigis policanon Hopkins.

Unu horon poste la gazetaĵo folioj jam flugis al la aro da buboj, kiuj tuj sin jetis ĉiufanken. Ili sin ŝovadis tien kaj ĉi tien sub la piedoj de ĉevaloj, ensaltadis en vagonojn de la kuranĵaj tramoj; post duonhoro ili jam estis ĉe la fino de la subtera fervojo kaj en la antaŭurboj de Brooklyn, kaj ĉe sonadis iliaj laŭtaj vokoj:

„Sovaĝulo en Nov-Jorko! Portreto de sovaĝulo vizitinta la meeting'on de senlaboruloj! Rompo de la leĝoj de la lando!“

La gazeta raportisto, kiu hieraŭ faris la fantaziezan portreton de la sovaĝulo, bananta sian familion en la urba fontano, tute neatendite nun povis fari uzon el sia desegnaĵo.

Hodiaŭ lia talenta verko ornamis centmilojn da gazetaj ekzempleroj, kaj multaj gravmienaj amerikanoj, revenante el siaj kontoroj, survoje malfermis la gazeton ĝuste ĉe la paĝo, kie troviĝas la figuro de la sovaĝulo, kiu dufoje rompis la leĝojn de la lando“. Kaj ĉar estis tre malfacile sin deteni de nevola komparado, la gazeto, ĝis kiam la motivoj de la enigma krimo de tiu enigma

estas nun la regula eldon-nombro de ET. Ĉ. 2470 ekzempleroj estas abone aŭ aĉete pagataj, la aliaj estas ne pagataj. Precize la nombro de la pagataj abonataj ekzempleroj estas 864, de la ne pagataj regule sendataj ekzempleroj 140, de tiuj sendataj al revendistoj 1685 (el kiuj kvanto restas nevendita), de tiuj sendataj al verkintoj de gravaj artikoloj, poemoj ktp., al anoncintaj firmoj, al gazetoj menciitaj en ET k. a. ĉ. 120. La minimuma nombro de la bezonataj ekzempleroj do estas ĉ. 2800. La ceteraj 400 ekzempleroj estas dissendataj propagandacele.

Oni komparu kun tiuj ĉi ciferoj tiujn de ni donitajn en la daŭro de la jaro: je 1. marto la nombro de niaj pagantaj abonantoj estis 900, je 15. aprilo 1200, je 24. julio 2000 kaj nun 2470. Do certe ĝojiga sukcesoj!

La varsoviaj esperantistoj ne povas ankoraŭ forgesi la en julio okazintan subitan morton de la plej fama pola sameano Antoni Grabowski, kaj jam denove ili estas devigitaj sciigi la tutmondan samideanaron, ke ĵus, la 1. nov., mortis unu el la plej malnovaj pioniroj de nia movado

Adam Zakrzewski.

Li naskiĝis 1856 en Podola Gubernio, nun Ukrainio, finis fizikan matematikan fakultaton en la peterburga Universitato kun scienca titolo „kandidato“. Li fariĝis membro de Antropologia Komisiono de la Krakova Scienca Akademio, membro de la Esp. Lingva Komitato, direktoro de la Urba Statistika Oficejo en Varsovia Magistrato, membro de la redakcia komitato de „Pola Esperantisto“ ktp. Ankaŭ li estis en la komitato de Varsovia Literatura Kasejo.

Kiel pola statistikisto, ekonomisto, antropologo, etnografo kaj lingvisto Zakrzewski publikigis multajn verkojn. Esperante estas konata lia „Historio de Esperanto“, multaj aliaj verkoj kaj artikoloj en la esp. gazetaro.

Dum la milito forpelite Rusujon, li multe suferis materiale kaj morale, kaj en gazetoj eĉ aperis sciigoj pri lia morto. Tamen li revenis, sed en tre mizera stato, malsana, kaj de tiu tempo li jam ne atingis sian antaŭan bonstaton.

Senpera kaŭzo de lia morto estis malfeliĉa akcidento. Irante sur strato, li ne aŭdis la signalon de veturigisto kaj falis sub la veturilon. Tuj li estis transportata al hospitalo, kie oni konstatis rompiĝon de lia kruro; post kelkaj tagoj li mortis.

Speciale en nuna tempo ni devas substrekigi la kristale puran karakteron de la mortinto, kiu dum sia tuta vivo agadis ĝuste laŭ la interna ideo de l' esperantismo.

La foriro de Zakrzewski ree ŝiras bedaŭrinde fendon en la vico de niaj plej eminentaj batalantoj. Precipe la rondo „Konkordo“, kies kunfondinto li estis, neniam ĉesos priplendi tiun teruran perdon.

Ad. Oberrotman.

Estas interese noti, ke Zakrzewski malgraŭ tio, ke li mem samtempe prilaboris projekton de lingvo internacia sub la titolo „Lingua international, essai d'un projet d'une langue auxiliaire internationale“ presitan 1905 sed nenie venditan, estis sincera kaj fervora esperantisto.

viro estos definitive klarigitaj, proponis sian klarigon, cetere tute ne insistante pri ĝia aŭtenteco: „Hieraŭ la malfeliĉa Hopkins klarigis al la sovaĝulo la nekonevcon de la banado de infanoj en urba fontano. Sciate estas, ke sovaĝuloj estas venĝemaj kaj malicaj. Kiu scias, eble Hopkins nun falis kiel senkulpa viktimo de fervora plenumado de sia devo en Broadway?“

En alia pli serioza gazeto la okazintaĵo estis presita sub la titolo

„Meeting'o de senlaboruloj.“

Ni rapidas doni al nia legantaro precizajn scigojn pri la okazintaĵo en Centra Parko. Kiel oni jam scias, la meeting'o de senlaboruloj estis fikŝita por tiu mateno, kaj jam de tagiĝo la placo kaj la ĉirkaŭaĵo pleniĝis je homoj en ita nombro, ke tio iom timigis la polickomisaron. Kaŭze de tio estis alvokita rezervo de policanoj. Inter la lastaj troviĝis la konata Hopkins, estinta boksisito, persono sufiĉe populara en nia urbo.

Maifeliĉa okazo, unu el tiuj, kiuj certe povas havi lokon en ĉiu urbo de nia ŝtato, en ĉiu ŝtato de nia lando, en ĉiu lando de la mondo (ĉar ĉiam estos riĉeco kaj malriĉeco, kion ajn diras la danĝeraj utopiistoj), — tiu okazo kreis specialan eksclitigon de la homamaso. Ne malproksime de la fontano, la loko, destinita por la meeting'o, pendigis sin en la sama nokto iu malfeliĉulo, kies nomo, profesio, eĉ nacieco restas ĝis nun nekongataj. Kio ajn estu, la polico certe montris sin iom senzorga. Unu el la raportistoj jam estis fotografinta la memmortiginton antaŭ ol la polico scitis pri la okazintaĵo. La polico venis por elpreni la kadavron el la maŝo jam tiam, kiam en la parko troviĝis multego da homoj, kies sorto tiel malĝaje estis ilustrita per la vido kaj la sorto de tiu malfeliĉulo.

(Daŭrigote.)

Fondo de Pola Esperanta Asocio.

Do — polujaj samideanoj!

Jen ekiĝis tio, kion vi tiel multe bezonis, kion vi tiel longe atendis: ekiĝis la neŭtrala „Esperanto Asocio de Polujo“. Ĝia sukceso estas certa. Jam nun alvenis multaj konsentaj sciigoj el Leszno, Turek, Chojnice, Kartuzy, Kalisz, Radom, Rzeszow, Osiek, Wyrzysk kaj Warszawa, esprimantaj, ke per la fondo de EAP oni forigos la ĝisnunan mankegon de tia organizo en Polujo.

Ankaŭ vi ne manku en la vicoj de la verdaj batalantoj, ankaŭ vi aliĝu kiel eble plej baldaŭ al EAP!

Ni montru al la esperanta mondo, ke ni samideanoj de Polujo estas sufiĉe fortaj, sufiĉe multnombraj, por krei asocion.

La Bydgoszcz-a samideano ekprenis la Esperanto-standardon de Polujo, ĝi ekstaris ĉe la fronto de la esperantaj polujaj batalantoj por gvidi ilin, kiuj tiel longe batalis sen gvidanto, sen organizo! Jam alten, tre alten levigis la standardo!

Sekvu ĝin! Ĝi venkos!

Libra kaj Arta Presejo Emil Friedr. Adolph

Fond. 1888. Hassloch (Palatinato) Telef. 58

Fabrikado de bonkvalitaj artprezaj prospektoj kaj de ĉiuj presejoj por komerc kaj industrio en ĉiuj eŭropaj lingvoj, inkluzive Rusa kaj Esperanta

Oni petu oferton.

Korespondado: Esperanto, Angla, Franca, Germana ktp.

Fremdula Legio. Atentu!

Ni serĉas la filon de ano de nia loka grupo, kiu malaperis dum la milito en la jaro 1918 en Nord-Francujo. Li estis korporalo en germana regimento, kaj lia nomo estis Hans Paetzold. Li estis el Perleberg kaj naskiĝis la 26. dec. 1895. Verŝajne li estas vundita kaj kapita de francoj. La gepatroj vane atendis sciigon. Li ne skribis ĝis nun. Ni supozas, ke li servas en la fremdula legio kaj ne volas iri aŭ skribi hejmen.

Ni petas samideanojn sciigajn ion pri li, doni al ni sciigon laŭ la adreso: Esperanta Grupo Perleberg, s-o Goreck, Wittenberger Str. 13, Perleberg, Germanujo.

Pogranda Manufaktura Magazeno

de en- kaj eksterlandaj manufakturaj

M. Bukszan, Varsovio
Nalewki 29 Telefono 266.59

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj manufakturaj firmoj.

Intarsioj.

Marketro-fabrikoj el ligno, perlamoto kaj metalo por fabrikejoj de mebloj, horloĝoj je favoraj kondiĉoj liveras

H. Knaup, Artmetiejo por Intarsioj,
Karpfengasse 8, Heidelberg (Germanio)

Oni petu specialan proponon! Reprezentantoj serĉataj por ĉiuj landoj.



LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO
POR TEKNIKO KAJ KONSTRUFAKO

Printempa foiro 1922 de la 5-a ĝis 11-a de marto
Aŭtuna foiro 1922 de la 2-a de aŭgusto ĝis 2-a de septembro

La centra merkato por la internacia komerc kaj ofertado

Same grava por eksportantoj kaj por aĉetantoj

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG

(Fonstacio por la Specimenfoiroj en Leipzig)

Anoncetoj.

GEDZIĜO. Alois Zednik, Banka prokuristo, kun sia edzino Sonjo nask. Zackova, anoncas sian geedziĝan feston, kiu okazis la 27. okt. en malnova magistrata domo de Praha. — Praha kaj Berlin-Gr. Lichterfelde-West (Roonstr. 15-3), en nov. 1921.

MORTIS nia samideano d-ro Vito Romita en Modugno (Italio) la 21. sept. 1921.

DIAPOSITIVOJ POR LUMBILDOJ de la XIII-a Kongreso, en sep diversaj specoj jam montritaj, por 180 kĉ. inkl. poŝtelspezoj; poste serio de la fotoj el la XIII-a. Malferma kunsido 12 kĉ., fremduloj 12 kĉ., 2 Karlus-Tyn po 7 kĉ., granda grupo 12 kĉ. kaj kelkaj en poŝtkarta formato po 8 kĉ. Riceveblaj ĉe J. B. Vlach, Praha II, poŝt-fako 504.

AMUZIGAJ NOVAĴOJ. Kiu povus min informi pri bonprosperantaj amuzigaj novaĵoj aŭ pri iaj projektoj aŭ eltrovoj, kiuj taŭgus por amuza entrepreno. Proponojn kun kondiĉoj bonvolu adresi al: Jan B. Vlach, Praha II, poŝt-fako 504.

VIDLIBRETO DE ANTWERPEN. Sendu simplan Internacian respond-poŝtkarton al s-o Frans Schoofs, del. UEA, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen, Belg., por tiu ricevi belan ilustritan 52-paĝan broŝuron pri la urbo Antwerpen, sidejo de nia VII-a Kongreso (1911).

ELDONISTON por „Baj Ganjo Balkanski“, humora rakonto de Aleko Konstantinov, okupota belan 50-60-paĝan broŝuron, serĉas la tradukinto I. Krestanoff LK en Pirdop, Bulgario.

ESP. EKSPOZICIO. Fritz Michalek, Reichenberg, Lerchenfeldstr. 20, Ĉeĥoslovakio, kolektas kaj interŝanĝas por konstanta esp. ekspozicio ĉiuspecajn esperantilojn, propagandilojn ktp.

„ESPERANTO“ de UEA, n-on 182 de okt. 1915, deziras aĉeti s-o Plossu, del. de UEA, 4 Place l. Achard, Grenoble, Francujo; por ĝi li pagos la montrotan prezon.

GRAVA ALVOKO. Aronĉino unuan en Pomeranio esp. ekspozicion, mi petas varmege kaj insiste ĉiujn klubojn esperantajn, redaktejojn, librojn, firmojn uzantajn Esperanton kaj privatajn personojn helpi nun per alsendo de gazetoj, libroj, broŝuroj, dokumentoj, prezaroj komercaj, specimenoj ktp., unuvorte per alsendo de ĉio, kio povus antaŭenpuŝi nian aferon. Al ĉiu sendanto mi esprimas miajn plej samideanajn antaŭdankojn. — F. Sielke E. J., del. de UEA, Gdansk 25, Kartuzy (Pomeranio), Polonio.

RUSAJ SAMIDEANOJ! Kiu povus sciigi s-inon Antonino Merinova, ke edzo en Hungario ĝin atendas kun malpacienca? (Antaŭ tri monatoj ŝi loĝis en Aul apud Semipalatinsk.)

ET n-ojn 1-7 ni reprenas liverante anstataŭ ili senpagan abonon de 1. jan. ĝis 31. junio 1922. Proponojn petas per poŝtkarto la administrato de ET en Köln-Horrem, Germ.

ET n-ojn 1, 2, 6, 7, 11, 12, 15 de 1920 estas dezirataj por Finnlanda Esp. Biblioteko. Kiu povas donaci ilin? Proponojn al Esp. Oficejo Finnlanda, Kasarminkatu 20, Helsinki, aŭ al la administrato de ET.

LIBRO-AMANTOJ ATENTU! Kiu estas amanto por antikva Luther-biblio, presita en 1585 de Hans Lufft? Prez-proponojn al Marg. Schocke, Breslau, Germ., Schweidn. Stadtgraben 1 (65).

TEKSAJO. Samideanoj aĉetas teksojn ĉe Otto Meister en Ronsdorf, Germ. Petu proponojn.

„BES-a ADRESARO de Esperantistoj el ĉiuj landoj“, 3-a eldono, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj, estas ricevebla ĉe la eldonanto „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov., por 10.50 germ. mk. aŭ 7 resp.-kup.

ĈIUN NOVAN ESP. LIBRON kaj aliajn esperantajn sendu kun notita prezo al esp. vendejo „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov.

GEJUNULOJ! Manuskripto roindiranta estas fondata. Gejunuloj verkemaj sin turnu, aldonante se eble poŝtm. por respondo, al H. Seppik, Tallinn, Manesi 7-12, Estonio.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Hannes Klaukainen, Finnlando, Wiborg, III S. I. R. stabo, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr., leteroj, poŝtkartoj kun ĉiuj landoj (bfl.).

S-o E. Tulkki, Finnlando, Wiipuri, Teallisuuskoulu, interŝanĝas poŝtkartojn kaj leterojn kun ĉiuj landoj.

S-o W. Tulkki, Finnlando, Wiipuri, Salmann prikonttori, interŝanĝas poŝtkartojn kaj leterojn kun ĉiuj landoj.

S-o Sulo Koivisto, Finnlando, Wiipuri, Sammankatu 37, interŝanĝas poŝtkartojn kaj leterojn kun ĉiuj landoj.

S-o Frant. Bailček, instruisto, Ĉerny Kostelec, Ĉeĥosl. interŝanĝas poŝtkartojn, leterojn, poŝtmarkojn, monojn kaj lernantulajn desegnaĵojn precipe kun ekstereŭropaj instruistoj.

S-o ing. Leopold Berger, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov., interŝanĝas poŝtmarkojn, poŝtkartojn, esperantilojn; kolektas adresojn por sia „BES-a Adresaro“.

Erwin Thun, Groltau 417, Bohemujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn (bfl.) kaj gazetojn kun ĉiuj landoj.

S-o Ad. Houben, Kattenberg 28, Borgerhout, Antwerpen, Belgio, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

John Tew. Eyck-Hinkel deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj. 2520 Channing Way, Berkeley, Kalifornio.

S-o Br. Kruszczynski, Bydgoszcz, Polonio, ul. Siemiradskiego 20, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Eksportado Importado
Reprezentanto de eksterlandaj firmoj
C. BOOT, ROTTERDAMO
Hollando Graaf Florisstrato 22 Hollando
Potas korespondi
Bankrilato: Nederlandsche Handel MS. Rotterdam.

**Komercdomoj,
Komercistoj, Reprezentantoj**
uzu en via propra intereso la servojn de la
Komercista Esperanto Grupo
Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14
kiu havas bonegajn rektajn rilatojn al gravaj germanaj firmoj kaj fabrikoj.
Perado senkosite!

Franz Döring, Freiburg i. Br.
(Germanujo) Zaisstr. 6
Pogrand-Komerc de Ligno
Tel. 2017. Telegr.-adr.: Holzdring Freiburghr.
ofertas:
Normaltipajn
Fervoj-relajn Trabojn
el kverko aŭ fago (angle „Sleepers“)
en ĉiuj dezirataj mezuroj, precipe por Anglujo, Belgujo, Francujo.

Kiu helpos?
Apartenante al la nuntempe tiom kompatindaj malgrandaj rentuloj, mi serĉas daŭran restadon kaj okupadon pri librotenda, korespondado aŭ ian konfidoficon en komerca aŭ privata domo. Mi ja estas iom maljuna, sed sana, tre vigla kaj laborema; aparta honorario ne estas postulata. Ankaŭ kiel zorgema gubernisto mi kapablas funkcii. Bonvolu vin turni al la redakcio de ET sub A 1.

„Sub la sankta signo de l' Espero“
Feliĉe naskiĝis al ni fileto la 29-an de oktobro 1921. Kun ĝojo ni tion sciigas al la gesamideanoj.
Ges-oj FRANS SCHOOFS-VAN DEN PUTTE.
Antverpeno (Belg) 45 Kleine Beerstraat.

Abonejoj de ET
en la landoj
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beersstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Fr. Gaševski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Slenčka, Hradec Kralové.
Estonia: Est. Esp. Unuigo, postkasi 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 31 rue de Clichy, Paris 9.
(Abonprezo: 0,45 fl. X nombro da dezirataj sinsekvaj numeroj.)
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeliu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa.
— Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U.S.A. The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Bulgaraj poŝtmarkoj
uzitaj, el la dum- kaj postmilitaj eldonoj, en granda kvanto, estas vendataj.
Tuj sciigu la prezon, laŭ kiu vi aĉetas cent diversspecajn poŝtmarkojn. Nur mendoj por pli ol dek mil pecoj estas plenumotaj.
Mendu ĉe:
Hristo Načev, str. Denkoglu 30a, Sofia, Bulgario.

Importo. Eksporto.
Pollanda Komerc Agentejo
Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10
deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, donas ĉiujn informojn pri la polaj komerclokoj.
Reprezentado. Perado.

Grandkomerco de Maŝinoj
Freiburg i. Br. Germanio
Kirchstr. 24
posedanto: J. Wrg.
Importo. Eksporto.
Aŭtomobiloj :: Motorveturiloj
Bicikloj
Kudromaŝinoj :: Skribmaŝinoj
Anstataŭaĵoj kaj Alaĵoj.
Eksporto al ĉiuj landoj je fabrikprezoj.
Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Desiras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj jenaj fraŭlinoj en la hispana urbo Tarrasa:
Basilla Montull, str. San Quirico 47
Tull Ubach, str. San Antoni 45 bis
Magdalena Soler, str. Serrano 7
Adela Perarnau, str. Mayor San Pedro 37
Maria Plans, str. Topete (Estanco)
Olert, str. Viveret 17
Sofia Chaler, str. San Mariano 124
Kornelia Juvinkel, str. San Mariano 124.
S-o Manuel Noelle Güell, General Arenales F. O. P., Argent., Sudameriko, deziras interkorespondadi kun gesamideanoj ĉiulandaj per leteroj aŭ poŝtkartoj ilustr., pri iaj temoj, precipe pri socialista movado; ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn, gazetojn, revuojn, librojn esperantajn ktp.
Karl Hermann, Düsseldorf, Germ., Becherstr. 52, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj.
S-o Walter Unruh, ingeniero, Glashütte-Sa., Germ., deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun samideanoj en ĉiuj landoj.
Torpedo-Oberrose Fritz Dehne, Zerstorer „V. 5“, 3 Halbflothe, Wilhelmshaven, Germ., deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun ĉiuj landoj.
Kiu sendos al mi 50 diversajn poŝtmarkojn stampitajn de sia lando, ricevos same tiom de mia lando. Ankaŭ mi korespondas per poŝtkartoj ilustr. — Kurt Wenzel, Düsseldorf, Germ., Scheurenstr. 49.
S-o Ludwig Schmid, instruisto, deziras korespondadi kun samideanoj ĉiulandaj, precipe kun fraŭlinoj. Adreso: Reinhausen/Regensburg, Bavario, Germ., Walhallastr. 198.
S-o F. Friebe, instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 24, Dresden-Dobritz, Germanlando, serĉas tujmondajn korespondemulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj pri ĉiu temo, precipe pedagogia; donas komercajn informojn.

Kiu deziras aĉeti bonan poŝtmark-kolekton de Meza Litovio (de generalo Zeligovski), skribu al S. Giller, Wilno, ul. Akademicka 5/42. Mi sendas 66 malsamajn pecojn por kvin (5) francaj frankoj.
S-o B. Szepessy, Hungario, Miskolc, Arany J. u. 29, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo. — Por 100-200 poŝtmarkoj mi donas saman kvanton da hungaraj poŝtmarkoj aŭ povas rekomenci laŭ la valorigo de l' katalogo Senf 1921, Michel 1920 (por eŭropaj poŝtmarkoj) kaj J. et T. 1920. Difektaj poŝtmarkoj estas maldezirataj. Unuaforte sendi mi ne povas, sed nepre rekomencas ĉiujn sendantojn.
Kalmann Papp, Hungario, Püspökkladány, korespondas kun geinstruistoj de la tuta mondo. Krome kolektas poŝtkartojn arte reproduktitajn.
S-o Hans Schwidrigoll, Wilhelmstr. 5, Oels, Silezio, Germ., deziras korespondadi per leteroj aŭ poŝtkartoj ilustr. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj.
S-o Rudolf Hobitz, Parksir 2, Oels, Silezio, Germ., deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn, esp. sigelmarkojn kaj esp. gazetojn. Mi korespondas angle aŭ esperante.
S-o Wacław Kwieciński, Wilno, ul. Żelazna-Chatka, dom S. Kielbowski, Meza Litovio, deziras korespondi per il. poŝtkartoj aŭ leteroj kaj interŝanĝi preferne nestampitajn poŝtmarkojn.
Korespondado pri diversaj temoj, interŝanĝo de poŝtkartoj ilustritaj kun ĉiuj landoj (krom Germ.) deziras la Esp. Grupo en Neustadt O. S., Untere Mühlenstr. 18, Germanio.
Düsseldorf, Germ., Nordstr. 77, II, Otto Weselmann, deziras interŝanĝi pensojn per il. poŝtkartoj aŭ leteroj; ankaŭ deziras esp. gazetojn.
S-o Fr. Derr, telegr. sekretario, Düsseldorf, Germ., Düsselstr. 65, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

Unuakvalitaj fabrikoj el
ŜTALO DE SOLINGEN
ĉiuspecaj ilaroj, bruligiloj, mezuriloj
estas liverataj de speciala firmo
Reinh. Maier Ww., Freiburg i. Br.
Klarastr. 1, Germ.
Eksportkatalogoj disponeblaj.
En kelkaj landoj ni serĉas ankoraŭ reprezentantojn.